



HOMOJ NI ESTAS
KAJ NENIG HOMA
ESTAS AL NI FRENO

TRA LA MONDO IRAS FORTA VOJO
PER FLUGILOJ DE FACILAJ VENTOJ

Kulturaj Kajeroj

É. MAHÉ →

DUMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO

Direktoro : H. MICARD, Prezidanto de la Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj, ÉPINEUX LE SEGUIN (Mayenne) - Tél 1 - (Francujo)

J A R A B O N O :

Sendotaj al : Micard Henri
Kulturaj kajeroj
Epineux-le-Seguin (Mayenne)
C. C. P. Nantes 2349-62
(Vidu la liston de niaj perantoj sur paĝo 4)

Simpla : 5 fkoj

Bonfara : 10 fkoj

JANUARO - FEBRUARO

1964

1

KULTURAJ KAJEROJ

1964

Januaro - Februaro

Dumonata informada kaj kultura revuo

REDAKCIA KOMITATO :

Sekretario :

P. Babin, 5, boulevard Buisson
Rochefort-sur-Mer (Franc.)

Komitatoj :

Paul Guillot
Frédéric Thébaud
Pierre Chevalier

ENHAVO

..

El la Kulturdomo.

Esperanto tra la mondo.

Turismo per Esperanto :

Tra Jugoslavio (J. Galiot).

Iom da Scienco :

La Suno (A. Jarlier).

Granda Franca pentristo :

Paul Cezanne (L. B.)

La « blues-kantoj »

Gravaj datrevenoj.

Por viaj infanoj :

La balo de la dekdu princinoj (Grimm).

Por via distro :

Nia konkurso.

Gramatiko per Bonhumoro.

La represo de artikolo el nia revuo estas permesita post interkonsento kun la redakcio. Oni bonvolu ĉiam citi la nomon « Kulturaj Kajeroj » kaj sendi ekzempleron de la revuo aŭ gazeto en kiu aperis la koncerna represaĵo.

KULTURAJ KAJEROJ

ne similas, ne similos al aliaj Revuoj.

KULTURAJ KAJEROJ

spegulos la vivon de nia Esperantista Kulturdomo.

KULTURAJ KAJEROJ

publikigos la plej gravajn prelegojn aŭditajn de niaj vizitintoj, kaj artikolojn de diverslandaj eminentaj esperantistoj.

KULTURAJ KAJEROJ

respondos al gramatikaj demandoj.

KULTURAJ KAJEROJ

prezentos konkursojn, kaj diversajn amuzajojn.
Ni deziras ke « **Kulturaj Kajeroj** » plaĉu al vi. Sendu viajn sugestojn, kaj kritikojn

H. MICARD.

El la Kulturdomo

Kiel kutime la Esperantista Kulturdomo preĝis, jam de kelka tempo, sian programon. La celo de la Kulturdomo estas ĉiam duobla : servi al Esperanto kaj per Esperanto. Tiu programo estas la jena : en Aprilo, okaze de la Paskaj ferioj (1-8 de Aprilo), UFE, la Franca Unuiĝo, organizas la nun kutiman periodon dediĉitan al la gejunuloj, estontaj ĝeinstruistoj. Dank'al subteno de La Ministerio de Edukado, 40 gejunuloj povos ĝui senpagan restadon en Gresillon. Tie ili sekvos kursojn kaj partoprenos gvidatajn konversaciojn por plibonigi la jam akiritajn konojn kaj praktiki la lingvon. Plie; por ke ili konstatu, ke per Esperanto oni kulturiĝas, pluraj prelegoj estos prezentataj al ili de altvaloraj prelegantoj el kiuj D-ro Ivo Lapenna.

Dum la somero, kvar diversaj periodoj okazos. La unua estos la nun mondfamaj « Kulturaj kaj Turistaj Internaciaj Ferioj ». S-ro Roose el Brugge respondos la demandon « Kio estas Arto ? » Kaj parolos pri « La evoluo de la Arto de post la Renesanco ». S-ino Roose pritraktos porvirinan temon : « Kiel resti juna ? », kun prakti-

kaj ekzercoj. S-ino Roux promenigos la ĉeestantaron tra Afrika Saharo per bildoj kaj muziko, parolante pri : « La vivo de junulo en Hoggar ». S-ino Cheverry prezentos la lokon de « Anjou en la franca vivo. » Tre bela kaj alloga programo, kiun kompletigos agrablaj ekskursoj en la tuta regiono.

La dua periodo permesos al la laboremuloj sin prepari por ekzamenoj sub gvidado de tri profesoroj el kiuj S-ino ROUX, kiu gvidos la superan kurson. La tria periodo, kiel kutime miksis laboron kaj distraĵojn en familia etoso. Kursoj diversgradaj okazos sed la ĉeestantoj povos partopreni la ludojn tiuokaze organizitajn kaj ankaŭ lerni bindarton kaj korboparadon. Fine, en Septembro, la Franca Unuiĝo organizos specialan stud-periodon por siaj anoj.

De post la lasta somero Gresillon ankoraŭ modernigis kaj plikomfortigis. Kelkaj novaj ĉambroj estos baldaŭ pretaj. Revizitu nian kastelon, aŭ, vi, kiu ankoraŭ ne plezurigis nin per via restado, venu por alporti al ni vian kuraĝigon kaj ĝui vere memorindajn esperantistajn feriojn.

**FRUA ALIĜO ESTAS REKOMANDITA
PETU TUJ INFORMOJN**

ESPERANTISTA KULTURDOMO

BAUGÉ (M.-et-L.) - FRANCUJO

Esperanto tra la Mondo



Esperantaj renkontiĝoj en 1964

— Nacia Franca Kongreso en Parizo, dum Pentekosto (16-18.5), kun vizito de la pariza foiro, prezento de la esperantlingva filmo « Angoroj », ŝipeta ekskurso sur la Sejno, tago de ekskurso. Aliĝo al UFE, 34, rue de Chabrol, Paris (10^e).

— Franca SAT-kongreso, en Rennes, dum Pasko (28-31.3). Adreso : Sro Martin, 33, rue Duhamel, Rennes (I.-et-V.).

— Internacia fervojista kongreso, Bruselo (9-15.5). Adreso : Belga Esperanta Fervojista Asocio, « Esperanto », Gare Centrale, Bruxelles (Belgujo).

— Kongreso de la esperantistaj katolikoj, en Valencia (Hispanujo) 23-30.7. Adreso : Sro Hertero, IKUE-kongreso, Calvo Sotelo 11, Valencia.

— SAT-kongreso, Narbonne, Francujo (25-31.7). Adreso : O.K.K., Villa « Espero », route de Carcassonne, Narbonne (Aude).

— 49a Universala Kongreso de Esperanto, Den Haag, Nederlando (1-8.8). Adreso : UEA, Universala kongreso, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam 2.

— Antaŭkongreso (turista) : Bruselo, 30.7-1.8. Adreso : Antaŭkongreso esperantista, 13, rue de la Reinette (Piippelingstr) Bruselo 1.

— Postkongreso : Leeuwarden (Nederlando), 8-12.8. Adreso : Fino A.A. Laverman, Julianalaan, 81 B, Leeuwarden (Nederlando).

— Internacia Junulara kongreso, Amsterdam, en la Junular-centro « Anne Frank Domo » (8-15.8). Adreso : en UEA (vidu supre).

— Eŭropa Ferio-Semajno, en Caslano, apud Lugano (Svisujo) 23-29.8. Ekskursoj al Boromeaj Insuloj, al Lugano, al Monto Lerna. Adreso : Hans Hunkeler, P.f. 417, Aarau, Svislando.

— Dum la tuta somero : liberaj restadoj ĉe la adriatika marbordo, en Jugoslavio, en esperanta libertempa vilaĝo de Primošten. Adreso : Internacia Esperanto-Somerumejo, Primošten, ĉe Sibenik, Jugoslavio

— ... kaj kompreneble, ne forgesu la agrablajn restadojn en nia Kulturdomo ! (Petu informojn).

Grava atentigo pri la kongreso de Tokio (1965)

Jam la organizo de la vojaĝo al la Universala Kongreso de Tokio, de 1965 (31.7-7.8), serioze

antaŭeniras. La enskriboj por la vojaĝo estos akceptataj en UEA ĝis proksima 31a de julio. Tiu aervojaĝo, startos la 27an de julio kaj finiĝos la 19-an de aŭgusto.

Esperanto kaj Scienco

— Matematik-fizika sekcio estas fondita ; ĉiuj fakuloj (matematika-fiziko, kemio) estas invititaj kunlabori. Kotizo de la fako : 5 steloj jare. Organiza komitato : Prof. V. Kulikov, Sazonova 33, **Omsk 7**, Sovet-Unio ; Prof. O. Reiersöl, Sophus Lie gt. 8, **Oslo**, Norvegujo ; Dr Carlo Minnaja, Viale Giulio Cesare 223, **Roma**, Italujo.

Por la sportistoj...

« Internacian Esperantistan Sport-Ligon » deziras fondi la Hungara Esperanto-Asocio (Budapest V, Petöfi u. 17).

... kaj la instruistoj

Por nova rubriko « Infanoj de la mondo skribas por vi », en Jugoslavio infana gazeto « Kek », Sro T. Sekelj, Studentski trg 10, Beograd, bezonas verkadojn kaj desegnaĵojn de ĉiulandaj infanoj. Li kompensas per libroj aŭ jugoslavaj infandeseĝnaĵoj.

« Kontakto »

Revuo por la internacia junularo

« Kontakto » celas servi kiel vere internacia forumo de la junularo helpe de la Internacia Lingvo. Ĉin eldonas Tutmonda Esperantista Junulara Organizo, la junulara sekcio de Universala Esperanto-Asocio.

(La junuloj, individuaj membroj de U.E.A., ricevos ĝin senpage, suplemente).

Diversaĵoj :

— « El Popola Ĉinio » senpage ricevebla en 1964 por la Esp.grupoj. Sendu : nomon kaj adreson de la grupo — nombron de la membroj — nomon adreson de la prezidanto al : Cina Esp. Ligo, P.O. Kesto 77, Pekino Ĉinio.

— En Bjalistok gazeto « Gazeta Bialostocka », aperigas priesperantan kronikon. Antaŭ ne-longe ĝi aperigis recenzon de la 6-a numero de « Kulturaj Kajeroj ».

— Nova esperantlingva bele ilustrita revuo aperis : « Ripozoj ». Abono ĉe UEA. Rotterdam.

— Karusel-vojaĝo tra Nederlando, Germanujo, Luksemburgo, Belgujo por esperantistoj. Informoj : I.T.C. gebouw 114, Schiphol, Nederlando.

TRA JUGOSLAVIO

La Esperantistoj el Grenoble kaj Saint-Egrève (Francio) faris mirindan vojaĝon.

La Kultura Esperanta Societo en Grenoble, kies Prezidanto estas Inĝeniero Dettwiller el la nuklea centro en Grenoble, estis promesinta belegan vojaĝon al la gelerantoj kiuj sekvis la diversajn kursojn organizitaj en Saint-Egrève, en Centro de Studo pri Nukleaj aferoj kaj en la du porinstruistaj seminarioj de la urbo. Ili estis rekompensitaj.

Milano, Venecio, la Dalmatia Marbordo kun oktaga restado de la Internacia Esperanta Kampadejo de Primošten, kie dekkvin nacioj estis reprezentitaj, Sarajevo, Banja Luka, Zagreb, estis la ĉefaj etapoj, entute dudek unu ravaj esplortagoj.

En ĉiu urbo, la organizantoj, malnovaj Esperantistoj, Sinjoroj Granier, Galienstein kaj Galiet, interrilatiĝis kun la lokaj geesperantistoj. Dank'al regula korespondado, ĉiuj detaloj pri la gastado estis interkonsentitaj, por ke ĉiuj kondiĉoj estu la plej favoraj rilatè la elspezojn.

Postlasinte Venecion, ĉiam tiel pentrin-dakaj alloga, kunpremita de varmega suno sur sia laguno, la longa serpentuma rubando de la adriatika vojo kondukis nin al Rijeka — iam konata sub la nomo « Fiume » —, eksa itala eksterlanda teritorio. Nia karavano, kore akceptita de Esperantistoj, kiuj survoje atendis nin, bone ripozis dum unu nokto en la taŭge aranĝita domo de Jugoslava Ruĝa Kruco.

La 19-an de Julio, alveno en Primošten, malgranda vilaĝo, kiu kuŝas inter Sibenik kaj Split. En belega pinarbaro, la grupo de Junaj Esperantistoj el la Zagreba Astronomia Observatorio, sub impulso de sia direktoro Dro Divjanovic, sukcesis kun ŝtata helpo, aranĝi belegan kampadejon kun kom-

fortaj dultaj tendoj, moderna restoracio, belega sanitara domo...

Certe estas ke niaj junaj geesperantistoj de longe forgesos nek la simpatian etoson de tiu internacia kampadejo, la ĝuadon de banoj en la pura akvo de la Esperanta Golfo, sub la hele blua aëro de Adriatika Marbordo, la ŝipveturadojn, inter kiuj la viziton al la akvofaloj de la rivero Krka, nomataj « Dalmatia Niagaro », nek la pentrandan manĝon de rostitaj ŝafidoj sur la Insulo de Ado.

De Primošten al Metkoviĉe, la malnova ŝoseo kroĉiĝas ĉe la rokoj. Baldaŭ bona alsfaltita vojo trapasos tie-ĉi, sed ni devas kontentigi per tiu mallarĝa, ŝtonplena kaj polva vojo, kie la meza rapideco ne superas 20 kilometrojn en horo. La preterpasadoj aŭ



kruciĝoj de aliaj aŭtomobiloj aŭ aŭtobusoj estas problemoj malfacile solveblaj : haltoj, lertaj manovroj okazas unu post la alia. Sentime, nia ŝoforo majstre gvidas sian pezan veturilon ; ŝajnas ke nenio mirigas lin.

Post dektrihora veturado ni alvenas en Sarajevo (200.000 loĝantoj) duonorienta, duonokcidenta urbo, kiu posedas ankoraŭ sesdek moskeojn, kie la mahometana pastro alvokas al la preĝo. Tutan tagon ni dediĉis al vizito de la urbo, de la ŝtata muzeo Gavrillo Princip, proksime al la malnova ponto, kie la arĥiduko estis mortpafita, de la ĉefa moskeo en kvartalo kun mezepokaj budoj, kie manlaboristoj fabrikas objektojn el ligno, kupro kaj arĝento.

Sarajevo fieras pri sian pendvagono kiu kondukas nin sur la monto Trebeviĉ, kie, vespere, ni ĝuas desupran vidaĵon al la urbaj lumoj. Stranga miksaĵo de antikvaj kutimoj kaj modernaj atingiĝoj.

Ankaŭ en Banja Luka, en Zagreb, la Esperantistoj atendis nin por gvidi nin kaj montri al ni la urbajn vidindaĵojn.

Returne, ni vizitis ankoraŭ la famajn grotojn de Postojna la plej vastajn en Eŭropo, kiujn oni vizitas enprofundiĝante subteron dum pluraj kilometroj per malgranda vagonaro. Neordinara regno, kiu posedas sian riveregon, la Pikva, kaj siajn senokulajn fiŝojn : la proteojn.

Certe la tridekkvar partoprenintoj kolektis multajn memorojn kaj ili konatigis kun simpatia popolo, kiu fidas estontecon. Nun, prosperante ili scias la servojn, kiujn Esperanto alportas por la internaciaj rilatoj ĉar tiu lingvo permesis al ili senpere interparoli kun loĝantoj de tiu belega lando. Ili tre dankas ĉiujn gesamideanojn kiuj akceptis ilin, gvidis la vizitojn, ĉie sindoneme akompanis la grupanojn kaj permesis plenan sukceson de la vojaĝo.

J. GALI T.



NE PLUS SERĈU

VI TROVOS LA ADRESOJN DE NIAJ PERANTOJ
SUR LA LASTA KOVRILPAĜO

Aŭ sendu vian abonon al :

MICARD - KULTURAJ KAJEROJ

EPINEUX-LE-SEGUIN (Mayenne) - Francujo

PCK Nantes : 2349-62

ION DA SCIENCO

LA SUNO

Je distanco de 150 milionoj da kilometroj troviĝas la Suno, nia stelo, kiu estas granda sfero de 695.000 kilometroj de radiuso kaj sen ĝia radiado la vivo, kia ĝi ekzistas sur la tero ne estus ebla. Oni povas studi la surfacon de la astro per teleskopo (sed oni devas uzi kolorajn aŭ fumaĵotajn vitrojn) kaj oni vidas tavolon nomatan « fotosfero ».

La surfaco de la fotosfero ne aperas glata sed flokeca kun miloj da grajnoj (1.000 kilometrojn da diametro) nomataj « riz-grajnoj ». Tiuj grajnoj, kies dispartigo estas preskaŭ unuforma prezentas akumulojn : torĉetojn, kaj regionojn kie mankas la « riz-grajnoj » : la « makulojn » kiuj aperas pli malhelaj. Makulo estas ĉiam ĉirkaŭita de torĉeto sed la plimulto el la torĉetoj ne havas makulojn. Makulo naskiĝis en torĉeto sed kiam ĝi malaperas la torĉeto iom plu ekzistas.

Gigantaj vorticoj (100.000 km. de diametro), en formo de sekcita konuso aperas maldekstre (por observanto el Francio) kaj malaperas dekstre post 11 aŭ 12 jaroj. La makuloj situas sur du zonoj nomataj « reĝaj zonoj » inter paralelaj cirkloj de 5° kaj de 30° ambaŭflanke de la suna ekvatoro. La nombro de makuloj pasas tra maksimumo ĉiun dekunuan jaron kaj tra minimumo post 6 jaroj. Tiu periodeco retroviĝas en la tera magnetismo, borealaj aŭroroj kaj seismaj fenomenoj.


Super la fotosfero troviĝas maldika tavolo nomata « inversanta tavolo ». Kiam oni pasigas la sunan lumon tra prismo, tiu lumo dispartiĝas por formi la sunan spektron, kiu konsistas el sep koloroj (viola, indiga, blua, verda, flava, oranĝa kaj ruĝa) kiuj montras nigrajn strekojn. Sed la spektro de la inversanta tavolo, kiu estas videbla ĉe la komenco kaj ĉe la fino de eklipso dum unu aŭ du sekundoj (fulma spektro) montras multajn spektrojn kolorajn kaj brilajn en samaj lokoj, kie estis la nigraj strekoj de la fotosfera spektro. Estas tiu maldika tavolo, kiu produktas la fenomenon de inverso de la strekoj.

Super la inversanta tavolo estas alia tavolo, brila kaj rozkolora, videbla dum totala eklipso, kiun oni nomis kromosfero. Ĝia spektro montras malmultajn strekojn de hidrogeno, heliumo kaj kalcio. Tiuj tavoloj inter fotosfero, inversanta tavolo kaj kromosfero ne estas simplaj kaj ne havas precizajn limojn. Sed el la kromosfero eliĝas grandaj, gasaj kaj koloraj ĵetoj nomataj « protuberancoj », kies longo ofte atingas duoblan distancon Tero-Luno aŭ kvinonon de la ŝajna diametro de la Suno aŭ dudekoblon de la tera diametro. La nombro kaj la amplekso de la protuberancoj prezentas saman periodecon, kiel tiuj de la makuloj. La ekstera parto de la suna atmosfero estas nomata la korono. Ĝi estas blanka, iomete luma kaj la brilo malpliĝas al la ekstero. Oni povas ĝin observi nur dum totala suneklipso. La spektro de la korono konsistas el kelkaj brilaj strekoj kiuj aperas sur kontinua malmulte luma fono. Tiuj strekoj devenas el hidrogeno. Sed ekzistas verda streko kiun oni atribuas al nekonata gaso : « la koronio » aŭ eble al konata korpo, kiu lokas en specialaj kondiĉoj.

La Tero ricevas el la Suno varmon kaj lumon kaj ankaŭ aliajn vibrojn (ultraviolajn) sed ĉiuj vibroj ricevitaj de la Tero ne venas el la Suno. Ĉar la Tera atmosfero estas opaka al tiuj vibradoj. De la grundo estas neeble observi ilin. Sed en la jaro 1959 oni sendis raketojn en la alta atmosfero (220 kaj 260 kilometrojn).

Transe de la korono aperas la zodiaka lumo, de elipsa formo kies centro estas la Suno kaj kies granda akso direktas laŭ la zodiako. Ĝi estas videbla nur okaze de ekvinoksoj dum mallonga tempo, antaŭ la sunsubiro kaj post la sunleviĝo. La zodiaka lumo montras la ekzistadon de polva atmosfero ege maldika.

La Suno estas meza stelo, malgranda kompare kun aliaj steloj, flaveta do ne tre malnova. Ĝi estas tre prodigema kaj sendas ĉirkaŭ si krom varmon kaj lumon, multajn radiojn. Ĝi sendas ankaŭ tre etajn partetojn el kosmaj polvoj. Tiu pol-



vo produktas la zodiakan lumon kaj la lumineskon de la Suna korono.

La centro estas sfero, kies radiuso estas la dekonon de la suna radiuso kaj kie okazas la termonukleaj reakcioj. Ĝi konsistas el du trionoj per hidrogeno kaj restaĵo per miksaĵo de aliaj elementoj. La temperaturo kiu valoras 6.000° sur la surfaco de la fotosfero atingas ĉirkaŭ 100.000° en la kromosfero kaj, en la korono, de 700.000° ĝis $1.000.000^{\circ}$. Tiu temperaturo estas tre alta kaj oni ne konas ties kaŭzon. Eble pro la falo de kosmaj polvoj.

Mi finos tiun artikolon per mallonga eltiraĵo el la libro de Charles Noël Martin, « Univers dévoilé » (Malkaŝita Universo) :

« La tuta fiziko de la ekstera Suno estas sintezo tre komplika de la leĝoj pri gravito, radiado kaj precipe elektrona magnetismo.

La sunbulo povas esti studita jam de kelka tempo dank'al la naskiĝo de nova scienco la « magneto-hidrodinamiko », kies objekto estas la fiziko de la plasmio. Oni nomas plasmio la jonan gason, kies atomoj perdis unu aŭ pluraj elektronojn ; la miksaĵo de jonoj kaj liberaj elektronoj estas kvara stato de la materio tre diferenca de solida, likva kaj gasa statoj, kaj estas tiu de stelaj atmosferoj, de stelaj internoj kaj grandparte de interstela materio ».

A. JARLIER.

Paul CÉZANNE



« Diligenta lernanto » de la kolegio Bourbon en Aix-en-Provence, Cézanne ricevis ĉiujn premiojn, kiujn lia amiko Emile Zola ne ricevis. Li estis feliĉa dum sia infanaĝo kaj kiel liaj samaĝuloj, ŝercis. Li partoprenis en fanfaro kaj ĉefe ŝatis ekskursi sur la montetoj, sin bani en la rivero Arc, ebriiĝi per suno, ekzaltiĝi per belaj revoj, ĉar li jam deziris fariĝi pentristo kiel Zola estis jam alvokita de verkemo. Cézanne sekvis kursojn sed lia patro estis « terura paĉjo ». Post longa vegetado en ĉapelvendejo lia patro fariĝis bankisto. Ege ambicia li ne konsentis ke lia filo fariĝu « Sirmisto » car li tute ne komprenis la pentro-arton. Fine, laŭ petego de Zola, kiu tiam loĝis en Parizo, li konsentis ke ankaŭ lia filo iru Parizon sed donis al li monatan sumon 125 frankan por ke « li ne estu tro malŝparema ».

En tiuj jaroj de la dua Imperio, la artomedio bolis. La « Salono » donis al la artis-

toj la solan okazon prezenti siajn pentraĵojn. Juĝantaro konsistanta el akademiaj pentristoj kaj oficialuloj, senkompatate formetis la artaĵojn, kiuj ne obeis la regulojn laŭdatajn de la Instituto. En 1863, tiom multaj estis la formatitaĵoj, ke, laŭ iniciato de Napoleono la Tria, alia salono estis malfermita, la « Salono de la Rifuzitaĵoj ». Manet estis jam tre konata ĉar tiu Salono estis multe vizitata de homamaso kelkfoje bruanta. Al la tiel nomita « Manet-anaro » apartenis Degas, Claude Monet, Auguste Renoir, Pissaro. Sed Cézanne, kvankam li admiris Manet, flankestaris de la « Manet-anaro ». Ĉar kiu tion kredus ? Tiu « stamfanta » Cézanne estis fakte dubo-turmentita, ŝanĝiĝema, malkontenta pri si mem ; li furiozeme pentris, sed ankaŭ furiozeme detruis siajn pentraĵojn ; li ofte translokiĝis sed ĉie kreis saman malordon. Sed li ĉiam maskis sian timon per krudaj fanfaronadoj. La gazeto « Artisto » diris ke « li estas speco de frenezulo, kiu pentras sub influo de drinkula deliro ». Ke li pentras « kiel oni kalkoŝmiras la fontano-graniton » kaj prezentas « rubaĵojn » faritajn el « fors-krapaĵoj de paletro unuaspekte metitaj sur malpuran tolon ».

Ĉar Monet titolis marpentraĵon : « Impreso », kronikisto alnomis la ekspozicianojn : « Impresistoj ». La kamaradoj de Cézanne alprenis tiun nomon kaj en 1877 kreis la « Ekspozicion de la Impresistoj ». Sed la publiko tute ne komprenis ilin kaj Cézanne, antaŭtempe maljuniĝinta, estis lacegita. Tamen, li nun sukcesis regi sian fajran temperamenton. Post la milito li loĝis en la valo de la rivero Oise kun Pissaro, kiu bone influis, kaj instruis lin. Plie, fine eniris lian vivon virino : Hortense Fiquet, kiu donis al li filon en 1872. Sed Hortense estis frivola, ne interesiĝis pri pentro-arto kaj ne alportis al li kuraĝigon. Cézanne ne parolis pri tiu ligiĝo, pri tiu patriĝo al sia patro pli kaj pli furioza pro la skandalo estigita de lia filo. La mona-

ta sumo de li donita estis nun malaltigita kaj pli malfacila fariĝis la vivotenado.

Cezanne revenis al Aix. Li estis 46 jara sed aspektis 10 jarojn pli maljuna. Subjugita de sia patro kaj poste de sia onklino, fratinino de lia patro, li denove foriris. Li reatingis Renoir, ĉe la Roche Guyon, postkurita de Hortense, kiu finfine povis edziniĝi kun li en 1886. Li fariĝis pli kaj pli silentema, kaj solecema, kaj vivis « flanke de la mondo ». Lia patro mortis kaj Cezanne subite fariĝis riĉa. Sed li ne profitis siajn riĉaĵojn ĉar liaj malsukcesoj malfierigis lin, kaj li fariĝis pli kaj pli ŝanĝigema, nerva, konsterniga. Tamen, liaj pentraĵoj neniam montris tiel potencon impreson de ekvilibro. Oni komencis paroli pri li. En 1891 E. Bernard skribis pri li en la eldon-serio « Nuntempaj homoj » ; en 1892, G. Lecomte, en « La Impresista Arto », parolis pri tiu « mirinda instinktulo ». Ekde tiu tempo, la famo de Cezanne, iom post iom, disvastiĝos.

Kaj jen okazis la « skandala testamento Caillebotte » ! En 1894, tiu pentristo kaj komortis herediginta al la ŝtato, sian kolekton lektanto, granda amiko de la Impresistoj, entenantan kvar pentraĵojn de Cezanne.

Fortegaj estis la reagoj sed la testamentaro estis akceptita. Iu Ambroise Vollard, kiu ĵus malfermis galerion kaj deziris disvastigi sian negocon, kalkulis kaj atendis la taŭgan honoron. Konsilata de Pissaro, Renoir kaj Degas, Vollard decidis la organizadon de ekspozicio de la pentraĵoj de Cezanne. Ĝi estis inaŭgurita en decembro 1895. Post kelkaj tagoj, la « tuta Parizo » konis Cezanne kaj pasie diskutis pri lia arto. Kelkaj diris, ke oni certe vidos liajn artaĵojn en Le Louvre ; aliaj, ke li pentris sensecaĵojn. Tiuj kvereloj altiris la aĉetantojn. La gloro de Cezanne pligrandigos jaron post jaro. Sed la pentristo estis seniluziigita. Plie li malsaniĝis pro diabeto. Li restis en Aix. Vollard venis al li kaj kolektis ĉiujn liajn pentraĵojn dissematajn en la regiono. Koraj rilatoj estiĝis inter la pentristo kaj la vendisto. Cezanne pli kaj pli pentris nur aŭskultante la laŭdojn al li venantajn. En 1904, la Salono dediĉis tutan ĉambron al li. Sed la 15-an de Oktobro 1906, li daŭrigis la pentradon de pejzaĝo sub la pluvo, malsaniĝis kaj la 22-an de Oktobro, 67 jara, Cezanne mortis, tute sola kiel li vivis... ! Sed lia deziro estis plenumita, ĉar li deziris morti pentrante.

L. B.

FILATELA KURIOZAĴO



Ĉu la filatelistoj devas malfermi novan rubrikon en siaj albumoj ? Tiu poŝtmarko antaŭnelonge eldonita de la Sud-Afrika Poŝ-

to estas la unua de nova teritorio : Transkei. Tiu teritorio estas la unua el la « Bantoustans », duon aŭtonomaj « nigraj » regionoj, starigitaj en la kadro de la Sud-Afrika Respubliko. Ĉu la filatelistoj devas konsideri tiun poŝtmarkon, kiel sud-afrikan aŭ kiel la unuan de nova teritorio, poste, eble, tute sendependa ?

LA "BLUES" KANTOJ

*Frumatene la blues eniris mian ĉambron.
Frumatene la blues eniris mian ĉambron
Mi diris : « Blues, mi petas, diru kial vi
[igas min splena ? »*

*Li rigardis min, ridetis, sed ne respondis.
Li rigardis min, ridetis, sed ne respondis.
Mi vidis lin ankoraŭfoje, li sin turnis kaj
[iris for.*

*Blues, ho ! Blues, vi scias, ke vi jam venis.
Blues, ho ! Blues, vi scias, ke vi jam venis.
Lastan fojon vi plorigis min kaj donis al
[mi sendormajn noktojn.*

(« La « blues » en la domo »).

La fontoj de tiu esprimrimedo, kiu intereseigas multegajn fanatikulojn, estas malbone konataj. La unua « blues »-kanto presita aperis en 1912. Ĝi estis dedĉita al nekonata politikisto kiu deziris subteni tiamaniere sian prielektan kampanjon. Ĝi estis komponita de iu W. Handy laŭ muzikaj rememoroj de la Suda parto de Usono, kiel li naskiĝis. Tri jarojn poste W. Handy denove presigis ĝin sed sub alia titolo : « Memphis Blues ». Tiu evento, nun konsiderata « historia », estis tiutempe tute ne rimarkita. Sed grandan sukceson renkontis en 1914 alia komponaĵo de Handy : « St-Louis Blues ».

Handy, kiu sin nomas « patro de la blues-kanto », diras en sia aŭtobiografio, ke li « utiligis la harmonion bazitan sur tri agordoj, kiu estas tiu de la kantoj de la nigraj dokistoj, de la kabaret-pianistoj, de la plac-muzikistoj, kiun oni renkontas en suda Usono ». Tiu muzik-formo estis uzita de tiuj, kiuj deziris esprimi siajn sentojn per speco de muzika monologo. Oni supozas, ke tiuj kantoj naskiĝis dum la granda evangelizado komence de la 19-a jarcento. Unu el la « teknikoj » utiligitaj de la evangeligistoj estis la taknido. Oni baldaŭ rimarkis, ke la himnoj vere fascinis la Nigrulojn. Tio estas tute komprenebla, ĉar oni ĉiam konstatis, ke la Nigruloj posedas grandan propran muzikan genion. Sed ili adaptis la muzikon de la blankuloj al siaj propraj Afrik-devenaj tradicioj. Pro tio skan-

далигіs multaj tiutempuloj. Tiamaniere naskiĝis la « negro spirituals », kies nereligia formo estas la « blues ». Fakte, kiam la Nigruloj asimilis la religiajn kantojn al ili instruitajn ili emis al kantado de siaj propraj zorgoj ; kaj tion ili faris kun granda talento.

Alia muzikologo skribis ke ne la « negro spirituals » sed la « field hollers » (labor-kantoj) naskis la « blues ». Antaŭ centoj da jaroj ekzistis la plendo-kantoj. La vojriparistoj kaj la koton-laboristoj adaptis al tiuj muzikoj ĉiujn parolojn, kiujn venis al ilia kapo. Ili plurfoje kantis la saman frazon ĝis ili pensiis pri alia frazo aldonota ».

Verŝajne la fontoj de la « blues »-kantoj estas multaj. Sed kio fakte estas la « blues » ? Sentimentala kanto, sed ne ordinara. En ĝi ekvilibre miksiĝas realismo kaj fantazio. Ĝi ofte naskiĝis okaze de historiaj faktoj : « La Boll-Weevil Blues » (la blues de la gren-skarabo) kiam tiu insekto detruis multajn koton-kampojn en 1925 ; la multaj « blues » kiuj ekaperis okaze de la granda migrado de la nigraj laboristoj al la nordaj fabrikoj. La « blues » kantas ankaŭ amon kompreneble sed kun granda originaleco.

La unuaj « blues » estis nur kantoj sen iu ajn instrumenta akompanado. Sed ili estis sufiĉe fleksaj por tia akompanado. La paŭzo, longa noto per kiu finiĝas la unuaj du frazoj, permesa al la akompanato sin fordoni al sia fantazio.

La komercigado de tiu muzika formo parte elĉerpis la fontojn de la tradicia inspiriĝo ĉar la instrumentoj pli kaj pli superis la kanton. La moderna « blues » ne plu kantas la komunan mizeron, la komunajn suferojn sed pli individuajn zorgojn : amon, jaluzon... Sed kvankam la ĝenro ne renoviĝas, la malnovaj « blues »-kantoj restas kaj parte kontribuas al la plenumado de tiu granda deziro de la nigruloj en Nord-Ameriko : la kompleta racia egaleco.

(El artikolo aperinta en « Informations et Documents »).

GRAVAJ



DATREVENOJ

Antaŭ 400 jaroj mortis en Romo

Michelangelo **BUONARROTI**. La granda itala artisto estis skulptisto, pentristo, arkitekto kaj poeto. Li do estis unu el la plej grandaj genioj de la okcidenta arto. Michelangelo montris la vojon de la Renesanco al la baroko. El liaj multegaj artaĵoj ni citos la freskojn de la Sikstina Kapelo, la Tombo-monumento de la Medicis en Florenco kaj la kupolo de Sankta Petro en Romo.



Antaŭ 400 jaroj naskiĝis en Pizo

Galileo **GALILEI**. « Tamen ĝi turniĝas », ek-kriis la granda itala scienculo antaŭ la tribunalo de la Inkvizicio ; li devis defendi la tezon de Koperniko koncerne la rotacion de la tero. Li estis profesoro en Pizo kaj Padovo. Li fondis la bazojn de la instruado de moderna mekaniko, de akustiko kaj de varmo. Li fariĝis multe konata ĉefe pro siaj astronomiaj eksperimentoj, kiam li uzis la astronomian lornon, kiun li mem konstruis.



Antaŭ 65 jaroj naskiĝis en Dresdo

Eric **KASTNER**. Tiu verkisto, kiu nun vivas en Munkeno estas sincera kaj spirita moralisto. En lia prozo kaj en lia liriko, sub tono delikata, kiu kvankam iras de atako al sarkasmo, sin kaŝas admono al socia justeco. Kástner uzas ankaŭ porinfanan tonon en siaj libroj por la gejunuloj ; « Tri viroj en negro », « Emilo kaj la detektivoj », « Punktchen kaj Anton », « Duobla Lotte » estas entuziasme legataj kaj el ili oni faris filmojn.

Por viaj infanoj:

Fabelo de GRIMM

La balo de la dekdu princinoj

Estis jam malriĉa soldato, kiu revenis de la milito. Li serĉis taŭgan lokon por sin instali kaj facile riĉiĝi. Dum li sidis en la gastejo, li aŭdis paroli pri « la balo de la dekdu princinoj » : la reĝo de la lando havis dekdu filinojn, princinojn tre belajn. Ĉiuvespere, la reĝo mem fermas la pordon de ilia ĉambro por ke nenio malbona okazu al ili. Sed ĉiumatene, ĉe iliaj litoj balŭoj kuŝas tute eluzitaj. Neniu scias, kien iras ĉiunokte la princinoj. La malkvieta Reĝo anoncis : « Mi donos rekompenson al la junulo, kiu malkovros la sekreton de la princinoj. Li edziĝos kun unu el ili, kiun li mem elektos. Sed, se post tri tagoj kaj tri noktoj la junulo ne trovis la sekreton li estos mortigita. Multaj junuloj provis sed nenion malkovrante, mortis.

« Ho ! », diris la soldato, « jen kio plaĉas al mi. La danĝero ne estas pli granda ol dum la milito. Mi provu ! Se mi sukcesos, mi havos ĉarman princinon, kiel edzinon ». Survoje al la palaco de la reĝo li renkontis maljunulinon, kiu demandis lin : « Kien vi iras, junulo ? » — « Mi deziras malkovri la sekreton de la dekdu princinoj. » — « Ne estas malfacile », respondis la maljunulino, « Nur atentu : ne trinku tion, kion ili proponas al vi. Ŝajnu dormemon. « Kaj dirinte tion, ŝi elpŝigis vualon, kiun ŝi donis al li : « Metu tiun vualon sur viajn ŝultrojn kaj tiamaniere vi estos nevidebla. Vi povos sekvi la princinojn, tute ne vidata, kaj vi rigardos tion, kio okazos. »

Tutkore la soldato dankis la maljunulinon kaj ekiris al la korto de la reĝo. « Vi povas komenci hodiaŭ vespere », diris la reĝo malafable, kaj li starigis liton por la soldato antaŭ la ĉambro de la princinoj. Tiuj ĉi ridetis vidante lin, kaj pensis facile lin trompi. Vespere la plej aĝa princino alportis al li varman trinkaĵon. Li ĝin afable akceptis sed ne trinkis kaj verŝis la lakton sur spongon, kiun li antaŭe kaŝis sub sian kitelon. Poste li ekkuis sur sian liton kaj tuj ekronkis. Aŭdante lin, la princinoj mokeridis kaj ili kuris al la vestoŝranko kaj elegante sin vestis por balo. Ili surmetis novajn balŭojn kaj baldaŭ estis pretaj foriri. Dekunu princinoj estis tre gajaj sed la dekdua estis maltrankvila. « Mi ne estas kontenta », ŝi diris : « ŝajnas al mi, ke io minacas nin ». Vi ĉiam estas timema », diris la plej aĝa. « Rigardu, kiel bone dormas la soldato ! » (Efektive, ŝajnis, ke li profunde dormas).

Sed la soldato observis ĉion. La plej aĝa princino frapis sur sian liton, kiu malaperis en truon de la planko.

Anstataŭ ĝi estis longa ŝtuparo. La junulinoj malsupreniris la ŝtuparon kaj la soldato, kaŝata en la vualo, ilin sekvis. Li estis tiel proksime de la plej juna, ke li metis sian piedon sur la robon de la junulino. Ŝi diris : « Iu paŝas sur mian robon ! » — « Stultulino », respondis la aliaj, « estas neniu ĉi tie ». Post la ŝtuparo estis el argento, kaj bruais, kiel sonoriloj. « Mi devas preni unu folion », pensis la soldato, kaj je ĝia bruo la juna princino saltetis sed la aliaj mckis ŝin. Alia haveno havis arbojn kun folioj el oro : la arboj de la tria haveno estis diamantoj. Krak ! krak ! la soldato deŝiris unu folion el ĉiu speco. La junulino timegis je tiuj bruoj sed la aliaj respondis, ke estas la princinoj, kiuj salutas ilian alvenon. Efektive ili atingis lagon. Dekdu ŝipetoj atendis kaj en ĉiu staris bela juna princo. La princinoj enŝipigis kaj la soldato sidis en la lasta ŝipeto. « Oh, oh ! » diris juna princo post momento, « la ŝipo ŝajnas tre peza / Ni restas malantaŭe. Mi ne komprenas tion ! » — « Eble estas pro la varmo », respondis la juna princino.

Baldaŭ ĉiuj atingis belegan kastelon ; ĝiaj ĝardenon pleniĝis je lumoj, muziko kaj ĝojo. Tiam ili dancis ĝis truoj aperis sur la bolŭoj de la princinoj. Malgaje, ili revenis al la lago kaj enŝipigis. Tiufoje la soldato saltis sur la unuan ŝipon kaj atinginte la ŝtuparon, li rapidis supren kaj enlitigis. Kiam la princinoj revenis li ŝajnigis profundan dormon. « Ni estas savitaj », diris la princinoj. Ili senvestiĝis, enlitigis kaj tuj ekdormis, metinte apud la litoj la truitajn balŭojn.

La morgaŭan tagon la soldato diris nenion, kaj duan fojon kaj trian fojon sekvis la princinojn en la belegan kastelon. La trian fojon li raportis belegan vazon ornamitan je juvelaj ŝtonoj. La lastan matenon la reĝo demandis lin, kolere, « Kien, dum la nokto miaj filinoj iras por danci ? » La junulinoj moke rigardis la soldaton. Kaj la soldato respondis : « Ili dancas en subtera belega kastelo, kun dekdu belaj princinoj. Jen folioj el argento, el oro, el diamanto, kiujn mi kolektis en la ĝardeno. Kaj jen ankaŭ la riĉa vazo, kiun mi prenis en la kastelo ». — « Ĉu vere ? » diris la reĝo rigardante la junulinojn. Ili ne povis nei, kaj restis konfuzitaj. « Kiun el ili vi deziras kiel edzinon ? » demandis la reĝo. « Ĉar mi ne plu estas juna, mi preferus la plej aĝan », respondis la soldato. La saman tagon, la edziĝo estis festata, kaj tiamaniere, la soldato fariĝis riĉa. Sed neniu princo el la subtera kastelo venis por danci dum la tago de la geedziĝo.

POR VIA DISTRO

NIA KONKURSO

1a Problemo :

Bonvolu korekti la erarojn, kiuj troviĝas en iuj (sed ne en ĉiuj) el la subaj frazoj. Estos kalkulataj 2 poentoj por ĉiu eraro bone korektita, sed estos forprenita 1 poento por ĉiu erara korektado. Do atentu !

- 1) La patrino donis al sia filo duonon de pomo.
- 2) Ekvidinte vunditon, la kuracisto alprok-simiĝis, surgenuiĝis kaj zorgeme lin flegis.
- 3) La gastoj trinkis po glaseton da vino.
- 4) Ni kredas ĉiam la aliajn pli feliĉaj ol ili estas.
- 5) La ŝipistaro ne sin montris inda je sia estro.
- 6) Neniu estas libera pri la obeado al la leĝoj.

2a Problemo :

(20 poentoj)

La solvo konsistas el 78 literoj, kiuj estas numeritaj. La literoj estas troveblaj per la sekvantaj ŝlosilvortoj :

24-26-27-5-2-36-9-10-31-32 = belkanta birdeto.

25-41-42-8-67-66-17-3 = Hommanĝanto.

51-6-7-77-78-1-6-5-20-22 = varmomezurilo.

53-54-21-62-63-64-12-76-33-34 = altranga diplomato.

4-6-44-11-43-58-59-45 = nomo de monato.

75-74-47-9-19-20-43-35-34 = mezeŭropa lando.

37-38-40-56-57-3-7-24-52-22 = usona ŝtato.

65-70-71-72-73-28-32 = herbtrancilo.

55-49-50-16-48-18-11-13-21-45 = melolonto.

30-60-68-69-14-6-17-4-2-76 = usona urbego.

23-74-28-8-36-39-78 = knabina karesnomo.

16-15-1-29-61-62-46 = egale junaj aŭ maljunaj.

1-78 = bela dirajo de la amerika filozofo Ralph W. Emerson (1803-1882).

Bonvolu sendi viajn respondojn antaŭ la 31a de Marto al : Sro P. Chevalier, 19, bd Lauriol Nantes (Loire-Atlantique).

AMUZAJ PROBLEMOJ :

Solvo de la lasta problemo : Magia kvadrato


	1	
4		2
7	5	3
8	6	
	9	

Vidu la apudan figuron. Loku la ciferojn ordigitajn de 1 al 9 sur paraleloj al la diagonalo AC (fig. 1). Kompletigu la kvadraton ABCD portante la ciferon de fako ekstere sur la sama kolumno sed en fako la pli malproksima kaj jen la magia kvadrato (fig. 2).

4	9	2
3	5	7
8	1	6

Nova problemo (Sro Jarlier)

Per 24 alumetoj mi konstruas la ĉi apudan figuron, kiuj estas la 8 alumetoj, kiuj mi devas forigi por ke restu nur du kvadratoj ?



GRAMATIKO PER BONHUMORO

« « Iam » esprimas tempon nedifinitan, dum « siatempe » esprimas tempon kvankam ne klare nomitan, tamen pli-malpli difinitan. « Mi volis siatempe proponi regulon » = « mi volis proponi en tiu tempo, kiam, laŭ mia opinio, la cirkonstancoj tion postulis. »


L.L. ZAMENHOF -- Lingvaj Respondoj



— Vi bonvolos siatempe sonorigi, por ke mi veku vin, sinjoro.



— Li neniam praktikas siatempan sporton !



— Mi bedaŭras, sed mi ne siatempe notis la starto-tempo !

Niaj perantoj

Aŭstrio : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse 2, LINZ (28 aŭst. ŝil.).

Belgio : S-ro Guyot Mateo, 18, rue Chefneux, BARCHON, Lg. (50 fr.).

Britujo : S-ro Frank Ashpole, 127 Midford Rd, Combe Down, BATH (7 ŝil.).

Ĉeĥoslovakio : S-ro Valentin Kibalčíč, TICHY POTOK, p. Brezonica n/T.

Nederlando : S-ro M. de Waard, Anemoonstraat, Capelle aan den IJssel, ZH pĉk : 209721 (3,5 guld.).

Germanujo (Okc.) : S-rc Joseph Bode, (16) KASSEL-Ndzw, Silberbornstr, 33 - pĉk : Frankfurt (M) : 234-759 (4 mark).

Germanujo (DDR) : S-ro Ernst Muthschall, 19a) HALLE (Saale), Am Bergmannstrost 18 - pĉk : Leipzig 510-28 (6 mark).

Hispanujo : Jozefino Monter Palomar, Muntaner 416, 1^a, 1-a, BARCELONO (55 pes.).

Italujo : S-ro Claudio Pontedera, Via Marco Polo 3A, Verona (600 liroj).

Itala Esperanto-Federacio, Corso C. Gali lei, 22, TORINO.

Jugoslavio : Slovenia Esp. Ligo, Komenskega 7, LJUBLJANA, Poŝtfako 239 (900 d.).

Norvegujo : S-ino Marit Delor, Oberst rodez veg 56, LAMBERTSEDER (7 kr.).

Danlando : S-ino Bodil Neergaard, Gothersgade 158, KOPENHAGO K (7 kr.).


Pollando : Asocio de Esperantistoj en Pollando, Nowy Swiat 27, VARSOVIO (36 zlotoj).

Svedujo : S-ro R. Dupuis, Helgagatan 36, uppg 13, STOCKHOLM S6, Postgiro : 157007 (6 kr.).

Svilando : Provizore vakas (Sendu viajn abonojn al la franca adreso).

Usono : S-ro C.S. Otto, 32 Hazelwood Rd., Bloomfield (N.J.) (1 dol.).

Aliaj Landoj : Ni serĉas perantojn en aliaj landoj. Oni povas pagi la abonprezon per steloj (14 st.), aŭ respondkuponoj (10 respk.), per libroj, aŭ per neuzitaj poŝtmarkoj. Sin turni al S-ro Micard, Epineux-le-Séguin (Mayenne), Franc.



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ
Maine-et-Loire
FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De junio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iam ajn karavanojn frue anoncitaĵn

Akceptas :

Por ripozi trankvile en atmosfero frateca ;
Por eklerni aŭ plulerni la internacian lingvon ;
Por ĝin praktiki per interŝango de ideoj ;
Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
Por studi specialajn problemojn ;
Por inter amikoj gaje libertempi ;
Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

venu al la ESPERANTISTA KULTURDOMO

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkuponon al :

ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, BAUGÉ (Maine-et-Loire) Francujo